# *Juan Manuel Santos informis pri nova ebleco diskuti haltigon de la milito.*



La kolombia prezidento Juan Manuel Santos, informis ke milita delegitaro de sia lando voja?os al Havano por ekdiskuti kun la gerilo la eblecon haltigi la fajron.

Proksimi?as  la momento ekdiskuti la reciprokan haltigon de la fajro kaj tio estas trascenda pa?o, esprimis Santos dum intervjuo kun la Hispana Televido dum vizito ?uskomencita en Hispanio.

Li esprimis sian optimismon pri la rezultoj de la intertraktado kun la armitaj revoluciaj fortoj de Kolombio (FARC) en Havano, kie jam estis traktitaj tri punktoj  de la laboragendo: politika partopreno, agrara reformo kaj narkottrafiko.

Li avertis, ke mankas ankora? du el la plej malfacilaj temoj la? sia opinio: la justico en la periodo transira kaj la malmobilizigo de la gerilaj fortoj.

La? la opinio de Santos, estos speciale tikla starigi linion inter justico kaj paco, ?ar kelkaj volas plian justicon kaj aliaj plian spacon por la paco, por ke ne estu pliaj viktimoj en la estonteco.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/48149-juan-manuel-santos-informis-pri-nova-ebleco-diskuti-haltigon-de-la-milito

**Radio Habana Cuba**